ESPERANTO EN AFRIKO
Oficiala bulteno de la Afrika Komisiode UEA
18-ajaro, N-ro, 48(2024 :01)

# ENKONDUKO

*ESPERANTO EN AFRIKO* estas la oficiala bulteno de la Afrika Komisio de UEA, kiu aperas regule post du monatoj. En tiu ĉi revuoj eblas legi informojn pri la esperanto-agado en Afriko, pri novaj planoj, projektoj, eventoj kaj plurajn teme buntajn artikolojn de aktivuloj kolektitajn el diversaj partoj de la subsahara afrika movad-areo.

*Karaj gelegantoj,*
*Ni dankas vin pro viaj diligenta kunlaboro kaj senĉesa apogado, kiujn vi konstante faras por la afrika esperanto-movado. Kiel vi scias, la 109a Universala Kongreso de Esperanto unuan fojon okazos en Afriko, en la plej paca lando de Afriko, pluraj esperantistoj afrikaj laboregas por la sukceso de tiu ĉi grandioza esperanta monda evento.*
*En ĉi-revua numero vi sendube legos malpli da informoj pri la Universala Kongreso, kompreneble ĉar la Loka Kongresa Komitato volas liveri pli ĝustajn kaj fidindajn informojn same kiel la Afrika komisiono, kiu ĉiel klopodas kune kun sia enkontinenta aktivularo por povi alporti pli da helpo al la organizado de la UK tial venos multon kongresteman vi ja legos en la sekva numero.*
*Ni esperas, ke la sekva numero alportos al vi pli certajn informojn pri la Kongreso, cetere, ni instigas al vi ŝpari monon kaj sufiĉe prepariĝi por partopreni la unuan universalan kongreson en Afriko kaj konatiĝi kun viaj afrikaj samideanoj, kiuj bedaŭrinde ne povas vojaĝi al aliaj kongresoj okazantaj eksterafrike pro diversaj kialoj ĉefe pro manko de vizoj.*
***Ĝuu la legadon!***

La redakcio

*************************************************************************************************

# SUKCESA SEMINARIO EN ARUŜO



Komuna foto dum la seminario en Aruŝo

Tridek unu geesperantistaj aktivuloj de Tanzanio, Burundo, Kenio, DR Kongo kaj Germanio lertiĝis, sub respektivaj gvidoj i.a. de Francesco Maurelli, Jérémie Sabiyumva, Maria Rosaria Spano kaj Costantine S. Mashauri pri kongres-organizado, informado, interpretado, turisma gvidado, teama laboro, merkatiko, krom per prelegoj kaj aktivaĵoj celante prepariĝi por la 109-a UK, en seminario ĉe la Aruŝa Internacia Konferenca Centro (AICC), la hejmo de ĉi-jara UK, de la 5-a ĝis la 7-a de januaro 2024.

La seminario havas kroman utilon en tio, ke ĝi helpas solvi konkretajn mankojn surloke.

"Estas aliaj flankaj bonaĵoj, nome la starigo de Aruŝa Esperanto-klubo, ekvigligo de la kenia asocio, ktp. Sed kompreneble mi esperas ke granda pluso estos antaŭeniri pri la kongresaj laboroj", skribis Francesco.

Ĉiuj enplektitaj partioj en la preparlaboroj de la unua UK pli ol neniam antaŭe elturniĝas laŭ siaj ebloj por la rapida pretigo de la aferoj, ke la potencialaj partoprenantoj de la kongreso povu kiel eble plej baldaŭ aliri al la informoj pri kostoj, priskriboj, datoj, partoprenkondiĉoj ktp., de la dumkongresaj ekskursoj, antaŭ kaj postkongresaj programoj. Same, al la informoj pri la loĝkostoj, servoj, distancoj, hoteloj, gastejoj rezervitaj por la kongreso, kaj al aliaj gravaj sciigoj en ligo kun la kongreso. Ĉiuj strebas plenigi la truojn tiel ke la afero povu marŝi plibone.

Pormemore, la seminario estas aranĝita de la projekto **Hakuna Matata**, kies kunmastrumantoj estas la kunordiganto de la Afrika komisiono de UEA, burundano Aimé-Patrick Manirakiza kaj tanzaniano John Magessa. Tiu ĉi lasta estis la loka organiza motoro kaj liaj nelacigebla entuziasmo kaj diligento estis kernaj por la sukceso de la seminario. La 109-a UK mem okazos sub la temo "Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo" en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, vi povas tion fari per https://uk.esperanto.net/2024/

Adjévi Adjé

# RAPORTO KADRE DE LA PROJEKTO NI SEMAS

Kadre de la projekto ¨Ni semas¨, la Malagasa Esperanto-movadistaro ricevis cent eŭrojn por subteni  la isntruadon de Esperanto en Malagasio. La monsumo multe helpis, helpas kaj helpos al la instruado de Esperanto en nia Lando.

## Pri la instruado

Per tiu mono, ni povis aĉeti materialojn utilajn por la instruado, ni aĉetis kartonajn paperojn por ke kune kun miaj gelernantoj povu krei niajn proprajn instru-materialojn. Ni faris ekzemple kartojn pri :

- La vetero
- La bestoj
- La horilo
- La demandvortoj
- La salutoj kaj bondeziroj
- Kelkaj afiksoj (Ge-, Mal-, Bo-, -ist, -In, -Il)
- La manĝaĵoj
- La transportoj

Ni plastigis ilin por ke ni povu ilin uzadi multfoje.

## Pri la ekskurso

Sabate, la 28an de oktobro, bone kaj sukcese okazis la ekskurson, 22 esperantistoj ĉiuj vivantaj en la ĉefurbo Antananarivo, ĉeestis tiun eksterordinaran renkontiĝon. Malagasa Esperantista Junulara Asocio organizis ĝin kun la subteno de la projekto ¨Ni semas¨. Du el la partoprenintoj estas el Andoharafosty, tie kie mi instruas hejme, kvar estis el IEK, unu el Manjakaray, du el Analamahitsy, du el Anosizato kaj la aliaj estas el la Klubo Verda Insulo de Esperanto (V.I.E), kiu troviĝas en Anosibe.

Ni rendevuis renkontiĝi antaŭ la enirejo de la nacia Parko Tsimbazaza je la 8a matene kaj fini je la 11a.

Multajn aktivaĵojn ni faris interalie :

Unue ni faris sinprezenton ĉar multaj ne konis unu la alian. Poste ni dividis la partoprenantojn en kvar kvaropulajn grupojn, ĉiu grupo havis komunan landnomon (Malagasio, Francio, Germanio kaj Italio) kaj pli poste, ni daŭrigis kun aliaj aktivecoj kiel :

- BESTOJ : ili prenis fotojn de bestoj kaj metis la respektivajn nomojn,
- **KRUCVORTENIGMO** estis tri malsamaj tabuloj kun nekompletaj vortoj. Ili prenis alfabetojn por kompletigi la tabulon kaj poste klarigas la formitajn vortojn.
- **DEMANDOJ POR ĈAMPIONO** : ni donis al la gelernantoj la demandojn precipe pri Esperanto kaj pri ĝenerala novaĵo en la mondo, kaj la grupo kiu respondas rapide kaj senerare estis la gajninto.
- VORTLUDO : ni donis kelkajn literojn kaj la partoprenintoj elektis ilin por formi el ili diversajn vortojn kaj donis la signifojn.
- TRADUKO : ili elektis francajn vortojn kaj tradukis ilin en esperanton, plie, elektis esperantajn vortojn, kiujn ili tradukis al la franca.

## Aranĝu laŭ la temo

Ni elektis kvar temojn (Transporto, fruktoj, legomoj, koloroj), kun almenaŭ sep vortoj kiuj rilatas al ĉiu unuopa temo,




ili elektis kaj aranĝis laŭteme.

Ni multe amuziĝis dum la renkontiĝo, lernantoj malkovris novan manieron por lerni; ili ne nur amuziĝis sed ankaŭ multe

lernis. Estas grave fari tian renkontiĝon por instigi al la homoj lerni plu.

**PRI LA KRUCVORTENIGMO :** ni donis al la lernantoj tabulojn kun nekompletaj vortoj. Apude ni metis literojn, kiujn ili devas preni por kompletigi la malplenan kazon por havi la bonan vorton. Poste ili klarigas unu al la alia, ĉar estis ankoraŭ novuloj, kiel la vortoj trovitaj signifas. Koncernitoj lernis multajn novajn vortojn.

La malagasaj Esperanto-Kluboj dankas vin ĉiujn, kiuj ne laciĝas subteni nin por la disvastigo de Esperanto.

RANJA Lydie

# ZAMENHOF-TAGO FESTATA DIVERSLOKE TRA AFRIKO

## Zamenhof-tago en Ganao

ILEI-sekcio el Ganao raportas :




Okazis Zamenhofa Tago en la lernejo **Lutheran** kune kun klubanoj en la lernejo, la teamo de ILEI-sekcio en Ganao kaj instruistoj en la sama lernejo. La speciala gasto estis **s-ro Paul Kwesi Mensah** kiu prelegis pri la historio de D-ro L. L. Zamenhof.

Ni kune kantis komunan kanton "Bona Amiko". Ni poste interbabalis kun niaj lernantoj dume ili postulas diversajn temojn pri Esperanto. Ni jam instruis Esperanton dum sep semajnoj ĉe la lernejo Lutheran, unuhoron semajne. La lernantoj firiis sekvontan semajnon kaj ni rekomencos la instruadon de Esperanto la duan semajnon de Januaro, 2024.

Estas plano prepari lernantojn por enskribiĝi en A1 ekzameno. Ni esperas ke la ideo kuraĝigos ilin plustudi. Ni ankaŭ nuntempe esplori oportunon kunlabori kun aliaj lernejoj tutmonde kie oni instruas Esperanton por ke niaj lernantoj havu okazon interbabili rete kaj koresponde. Sube estas kelkaj fotoj kaj Jen la poŝtadreso de la lernejo: Esperanto Klubo.

St. Paul's Lutheran School, PMB, 78, Accra North, Ghana

## Zamenhof-tago en Kinŝaso

Okaze de Zamenhofa Tago, Demokratia Kongolanda Esperantisto-Asocio (DKEA) povis organizi ĉi tiun sabaton la 16-an de decembro 2023 la feston kun

delegitoj de kelkaj kluboj en Kinŝaso en la "Espace Elite" en la komunumo deLingwala en Kinŝaso.

En lia parolado, la Prezidanto de DKEA S-ro Guy Roger ILEKA bonvenigis ĉiujn partoprenantojn kaj dankis ilin el la fundo de lia koro. Li klarigis al ili, ke Zamenhofa Tago estas festata ĉiun 15-an de decembro de ĉiuj Esperanto-parolantoj tra la mondo, Sed en Kinshaso malgraŭ la malfacilaj tempoj, ni festas ĝin hodiaŭ pro kialoj sendependaj de nia bona volo.

Ni kantis en Esperanto, ni dividis la manĝojn kaj trinkaĵojn planitajn por tiu ĉi grandskala aranĝo.

S-ro LUKINGISA SUMBU Jean-Pierre, la Reprezentanto de UEA ĉe Unesko en nia lando legis fragmenton pri la vivo de Louis Lazare Zamenhof, kreatoro de la universala lingvo, Esperanto.

Poste, li listigis 10 aferojn sub la titolo "Kion vi povas fari post studado de Esperanto?"

Tuj, preskaŭ tridek prezentis ekskuzojn ĉar ili estis blokitaj en monstra trafikŝtopiĝo.

La neesperantistoj, kiuj venis al la aranĝo, tuj esprimis la deziron lerni tiun ĉi belan lingvon nomatan Esperanto. Je ilia zorgo, la Prezidanto de DKEA trankviligis ilin, ke ili komencos la kurson vacape venontsemajne nur sufiĉe longe por organizi la grupon. Li elektis la Ĝeneralan Sekretarion, S-ron Mafuila Mavomo Jackson kiel instruiston de ĉi tiu virtuala klaso.

Cetere, la Ĝenerala Sekretario de DKEA estas granda instruisto de Esperanto, kantverkisto kaj

poeto en Esperanto, kiu estas enhospitaligita ekde la fino de oktobro post morta akcidento.

Sed, sur lia malsanlito, li instruas Esperanton al lernantoj en Angolo kaj aliloke. Cetere atentindas, ke la dua vicprezidanto de DKEA, s-ro Arlain Kizeyidioko Mayinda kiu ankoraŭ tre aktivas, sekvis la ceremonion el Lomé en Togolando, kie li festis Zamenhofan Tagon.

La Prezidanto de DKEA informis la publikon pri la premio Hans Bakker aljuĝita al du niaj samideanoj, nome Arlain Kizeyidioko Mayinda, nia samkomitantano kaj Espoir Kasati Ngoma el Lubumbashi en la provinco Supra Katango. La ĉeestantoj ĝojkriis kaj aplaŭdis pro la bonŝancaj venkintoj. DKEA dankas al la Afrika Komisiono kaj al S-ro GBEGLO Koffi pro la bona laboro, kiun ili faras. La ceremonio finiĝis per familiaj fotoj por eternigi la eventon, kiu okazis en bela festa etoso.

S-ro Paul Alcee Mazangu
Kultura konsilanto.

# Zamenhof-tago en Senegalo, elrezultiĝas nova stabo de SEJ

Sabate, 16a decembro 2023, la Senegala Esperanto-Asocio (SEA) renkontiĝis okaze de la Zamenhof-Tago okazunta 15an decembro 2023. Ĉin tiun kunvenon partoprenis :

1. Assane Faye
2. Thierno Ba
3. Hawa Diol
4. Lafi Charles Diatta
5. Abdou Karim Fall
6. Diarietou Diol
7. Mapenda Diallo
8. Odilon
9. Samba Faye (Bouz)

En la kunveno, ni interŝanĝis pri la kreinto de Esperanto, L.L. Zamenhof, lia vivo, la kialo, kiu puŝis lin krei ĉi tiun lingvon kaj ĉion, kio rondiras ĉirkaŭ la fonda patro.

SEJ (Senegala Esperanto-Junularo) kunvenis por okazigi sian Ĝeneralan Asembleon kaj establi sian novan oficejon. Per voĉdono, la Asembleo decidis elekti al la posteno de:

- Prezidanto : **Hawa Diol**
- Ĝenerala Sekretario : **Abdou Karim Fall**
- Vicsekretario : **Diarietou Diol**
- Kasisto : **Mapenda Diallo**
- Vickasisto : **Nafissatou Cissé**

Por la aliaj postenoj kaj komisionoj disponeblaj, ni konsentis starigi ilin poste kun la ĉeesto de la plimulto da membroj. Fine, ni diskutis la perspektivojn de la organizo por popularigado kaj disvastigo de la lingvo en Senegalo.

Abdou Karim Fall,

Ĝenerala Sekretario de SEJ

## Zamenhof-tago en Lubumbaŝi

La esperantistaro de Lubumbashi unuafoje kunfestis sian tute unuan esperanto-aranĝon, la Zamenhof-tago la 31an de decembro 2023. La evento disvoliĝis en partenera preĝejo, kie amasiĝis deko da esperantistoj el 50 invititoj. La partoprenantoj venis tiom malmulte ol antaŭvidite pro tre evidentaj kialoj ĉisubaj :

1. La 31a de decembro estis dato dum kiu la Konga Sendependa Elekta Komisiono planis publikigi la rezultojn de la pasintaj balotoj. Ĉiuj pensis, kiel kutime la publikigado okazos dumnokte, male, ĉio okazis tiutage posttagmeze, kio bremsis multajn invititojn neesperantistoj partopreni;
2. La preĝejestro, unu el la lernantoj de esperanto ne povis veni pro forpaso de sia fratino tagon antaŭ la okaziĝo de la evento, la informo pri tiu forpaso venis posttagmeze sabate, la 30an de decembro, tio estis ankaŭ plej kortuŝa kaŭzo de malforta partopreno, ĉar la plejmulto de lernantoj de nia klubo estas anoj de tiu preĝejo, do multaj iris al funebro. La evento estus haltigita ĝis la funebro-fino, sed tio ne okazis ĉar ni jam estis aĉetintaj ĉiujn necesaĵojn;
3. La lasta bremso estis forta pluvo kiu falis horon antaŭ la evento, multaj

invititoj ne povis veni pro tio, ke survoje estis granda glita koto.



La evento ne celis nur Esperanto-lernantojn, sed ankaŭ estis invititaj neesperantistoj por ke tiuj lastaj povu ankaŭ oportune ekscii pri Esperanto.

La prelegoj estis tiom allogaj, ĉefe pri la historio de L.L Zamenhof! Kelkaj scivolemuloj starigis demandojn rilate la historion de Zamenhof precipe pri kiel esperanto estis ricevita de homoj el malsamaj landoj. Lernanto legis esperante la celojn de la esperanto-grupo ESPERANTO-KLUBO DE LUBUMBASHI, alia lernanto laŭtlegis salutmesaĝojn senditajn al la tuta ĉeestantaro.

Espoir Ngoma Kasati

## RAPORTO DE SENEGALA ESPERANTO-JUNULARO

Senegala Espranto-Junularo kunvenis ĉi-dimanĉe la 7-an de januaro 2024 por ellabori la ĉiujaran vojmapon. Ni ŝatus sendi niajn bondezirojn al la movadanoj kaj al ĉiuj esperantistoj tra la mondo. La kunvenon partoprenis la jenaj membroj :

1. Hawa Diol
2. Abdou Karim Fall
3. Nafissatou Samb
4. Samba Faye
5. Boniface Jean Diatta
6. Mouhamadou Lamine Kanté
7. Mapenda Diallo

## Prezento de jara vojmapo

### Revivigo de agadoj

Ni starigis la agadplanon por la jaro 2024 en la sekva tabelo, kiu montros la datojn de kunvenoj por plibonigi la lingvan nivelon de membroj. Ĉi tio estas la kontinueco de vizaĝ-al-vizaĝaj kursoj plifirmigitaj per virtualaj debatoj, kie ĉiu membro ricevos siavice temon por prezenti. La tablo jenas :

| MONATOJ/AGADOJ | Fizikaj kursoj | Virtuala debato | Fizikaj kursoj | Fizikaj kunvenoj |
|---|---|---|---|---|
| JANUARO | 14a | 19a | 28a | 7a |
| FEBRUARO | | 16a | | |
| MARTO | 10a | 15a | 24a | 10a |
| APRILO | 14a | 19a | 28a | |
| MAJO | 12a | 17a | 26a | 12a |

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| JUNIO | 9a | 14a | 23a | |
| JULIO | 14a | 19a | 28a | 14a |
| AŬGUSTO | 11a | 16a | 25a | |
| SEPTEMBRO | 15a | 20a | 29a | 15a |
| OKTOBRO | 13a | 18a | 27a | |
| NOVEMBRO | 10a | 15a | 24a | 10a |
| DECEMBRO | 8a | 13a | 22a | |
| HOROJ | 15a-17a | 20a | 15a-17a | |

Notindas, ke la monato februaro koincidas kun la prezidantaj elektoj de la lando, tial oni konservas nur unu daton.
Ankaŭ gravas noti, ke datoj povas esti ŝanĝitaj aŭ modifitaj laŭ la postuloj de la asocio kaj ĝiaj agadoj.

## Masigo de agadoj

### Renkonti la Autoritatojn kaj la junularoj de la lando

Post la kunvenoj por revigligo de aktivadoj, la membroj de Senagala Esperanto junularo ankaŭ ellaboris planon por amasigo de membroj. Efektive, ni planis renkonti la agantojn de kulturo en Senegalo, edukado kaj junularo. Ni celis entojn kiel « Cercle Maurice Gueye », Fondaĵon « Sococim », la ministeriojn pri Kulturo, Edukado kaj Junularo.

La celo de tio estas povi alproksimiĝi al gejunuloj en la lando organizante konferencojn, kie ni elmontros la genezon kaj avantaĝojn de la lingvo por allogi junulojn. Por tio ni ankaŭ petos financan kaj loĝistikan helpon por la sukcesigi ĉi tiun projekton.

### Ĉeesto en sociaj retoj

Ĉi-jare, la asocio planas pliigi sian ĉeeston sur novaj komunikaj kanaloj kiel Facebook kaj Instagram por pli da videbleco kaj alproksimiĝi al junaj Senegalanoj per tiu efika rimedo, kiun ili multe uzas.

### Diversaj Kontribuoj/Kotizoj

Ĉi-jare, ni ankaŭ rekomencos kontribuojn/kotizojn kun pli da rigoreco. Per konsento, estis decidite, ke oficejaj membroj kontribuos 1000 CFA-frankojn monate kaj simplajn membrojn, 500 CFA-frankojn monate ekde januaro. Nia celo estas krei membrokartojn por ĉiu juna esperantisto.

La prezo de karto estas 2500 FCFA. Ĉiuj membroj estas petataj aĉeti kelkajn por rekono de niaj membroj antaŭ la monato februaro.



Informoj
La membroj ankaŭ havas la mallongdaŭran celon malfermi bankkonton kiu estos administrita de la kasisto.
Kaj ankaŭ renovigi la paperojn de la asocio post ŝanĝoj en la oficejo. La proceduroj komenciĝos de ĉi tiun semajnon.

Elektoj de la resto de la oficejo
Koncerne la oficejon, postenoj restis plenotaj. Membroj voĉdonis por :
**Vicprezidanto** : Boniface Jean Diatta
**Konsilantoj** : Ismaïla Dione kaj Mouhamadou Lamine Kanté

### Dokumento pri aĝlimo

Pri la polemiko, kiu estiĝis kun la aĝlimoj, la membroj volas trankviligi TEJOn, ke en Senegalio la aĝlimo por junuloj estas de 15 ĝis 35 jaroj. La sekva oficiala dokumento atestas tion: https://au.int/sites/default/files/treaties/7789-treaty-0033_-_african_youth_charter_f.pdf .
Ĉi tiu afrika ĉarto ratifita de Senegalo asertas tion en sia preambulo. Ni invitas vin legi ĝin.

*Ni alvokas ĉiujn membrojn de Senagala Esperanta Junularo respekti ĉi tiun programon kaj plenumi ĝin. Ni memorigas al ĉiu membro, ke ili devas montri sindevontigon, regulecon kaj sindonemon ĉar ni laboras por Esperanto. Ni esperas, ke ĝi estos bonega jaro por la lingvo en Senegalo!*

ABDOU KARIM FALL

## Goma Esperanto-Klubo

Niaj karaj amikoj, saluton. Antaŭ ĉio la asocio solidareca bonvolo kun siaj partneroj deziras al vi bonegan kaj feliĉan novan




jaron.
prezentante al vi ĉi tiun jarraporton pri la instruado de Esperanto kaj ankaŭ aliajn agadojn rilate al instruado, vi ja scios multon pri nia Movado. Kion kovros tiu ĉi raporto? tiu ĉi raporto baziĝos sur du punktoj: - Detalo de la instruado kaj Dankado .

### Detalo pri instruado

Dum ĉi tiu jaro (2023), ni lanĉis okazon lerni la internacian kaj neŭtralan lingvon Esperanto al ĉiuj feriantoj, infanoj kaj plenkreskuloj en la urbo Goma de la 3-a de julio ĝis la 3-a de oktobro 2023, de la 9-a ĝis la 11-a. Ĉar la urbo Goma havas amason da esperantistoj, ĉiuj esperantistoj ne ĉesis varbadi pri la nova trejnado lanĉita, pro tio multnombraj personoj rapidis profiti tiun ĉi okazon. En ĉi tiu areo ni havis 20 adoleskantojn, 15 plenkreskulojn, kaj 30 infanojn (inkluzive de la infanoj de Mama Wimbi) do entute ni havis 65 homojn dum la tago de la lanĉo kiel kutime, en la tago de la lanĉo, la lernantoj serĉas kompreni la utilecon de Esperanto en siaj estontaj vivoj, feliĉe la Esperanto de la urbo Goma havas baobabon kaj veteranon en la esperantista movado, kiu donis kontentigan respondon preskaŭ al ĉiuj zorgoj. Tri klasoj estis disponigitaj por gastigi lernantojn, por kelkaj el la lernantoj aperis iuj malfacilaĵoj, kiel: - la distanco inter la centro kaj ilia loĝloko, - malfrua kompreno por iuj – ktp.

Entute 21 personoj (adoleskantoj kaj plenkreskuloj) plenumis la programojn kaj povis partopreni en la ekzameno organizita

de la komitatanoj de la grupo, organizis ni la parolan kaj skriban ekzamenojn. Trapasinte ĉi tiujn du ekzameno-sesiojn, ni rimarkis, ke estas du homoj, kiuj ne atingis la maksimumajn poentojn por transiri al publika defendo.
Post la ekzamenoj, la komitatanoj daŭrigis la preparadon de la defendado, kiu certe okazos la 31-an de decembro 2023.
Fine okazis la defendado kaj ĉiu el la kandidatoj havis kvalitan atestilon ofertitan de la administrado de la menciita asocio kaj subskribitan de la superrigardanto de la agado de la grupo GEK WASEKA KAMANGO ALPHONSE.

La materialojn kaj bezonojn garantiis la asocio SBV

### Dankado

Ni ŝatus ELKORE danki vin : la partnerojn de la asocio sbv, la instruistoj kiuj gvidis la lernantojn dum ĉi tiuj tempoj, la prezidantino DJOFINA MUNGOSI , jean de Dieu kikako, la Sekretario kaj Kasisto Marcelin LUHEKA, la Konsilantoj Eric BAENI, Grace wazi, Etienn LUHEKA, kaj ĉiuj samideanoj ne cititaj.
Raportis al vi Marcelin luheka,
Sekretario de Goma Esperanto-Klubo .

LUHEKA Marcelin

# RAPORTETO PRI ESPERANTO-AGADOJ

FARITA EN RUTSHURU DECEMBRA MONATO 2023.

## Ĝenerala enkonduko



Karaj kamaradoj **ESPERANTUJE,** akceptu niajn sincerajn salutojn! Jen, ni denove estas antaŭ vi kun la celo rakonti al vi pri agadoj de la decembra monato, la lasta monato de la jaro 2023.
Pri tio, bonvolu ricevi kelkajn liniojn markantajn la malsamajn agadojn de niaj respektivaj kaj aktivaj grupoj:
**Verda Stelano – Klubo, Ĉiam Antaŭen kaj Instituto NJILI – Buzito.**

## Verda stelano-klubo

- La promocio de 6 junaj esperantistoj jam kompletigis tiun ĉi 22-lecionan programon /Hubert Ferez; ĉar ĉi tiuj sekvantaj esperantistaj prepariĝas por fari ekzamenojn por akiri siajn atestojn pri la sukceso;
- La nova teamo de 7 junaj knabinoj kaj knaboj kandidatoj ĉeestas la vesperan Esperanto-kurson ĉiun lundon kaj

vendredon vespere (15:00 ĝis 17:00). Ĉi tiuj membroj jam estas en la 10-a leciono.

- Membroj de diversaj kluboj kaj gastoj povis festi la naskiĝtagon de S-ro Doktoro de Esperanto Ludoviko Lazaro Zamenhof en nia teritorio en etosa tago kiu estis rimarkinda.
- La kunordiganto de ĉi tiuj malsamaj kluboj moderigis dum ĉi tiu speciala tago (la 15-an de decembro 2023).
- Dum tiu ĉi tago, li klarigis la monologon trovitan sur la malantaŭo de la 9-a leciono al ĉi tiu asembleo.
- La prezidanto de la Klubo Verda Stelano Klubo **Prosper GATO NDAYAZI** deklamis poemon rilatantan al la lingvo Esperanto.
- Disdono de kajeroj, plumoj, krajonoj (subvencio de la filio « Ni semas » de UEA).
- Disdono de Esperanto-insignoj al membroj de la Klubo (Verda Stelano – Klubo).

### ĈIAM ANTAUEN (Grupo de infanoj)

- Sidado de la infanoj de tiu ĉi grupo por studi kiel akiri sian donacon donitan de la asocio nomata "NI SEMAS DE UEA".
- Ni disdonis kajerojn, plumojn kaj krajonojn al ĉiuj asociaj membroj de **Ĉiam Antaŭen.**

### NJILI INSTITUTO – BUZITO/REMERA

Dum la monato decembro, la lernantoj de la mezlernejo BUZITO – NJILI povis sekvi la kurson de Esperanto dum 2 semajnoj kaj duono. Ĉar la aliaj semajnoj estas en la finjaraj festotagoj de 2023.

## Zamenhof-festo en Ruĉuru

Estas kun entuziasmo, ke ni membroj de « Verda Stelano – Klubo », membroj de « Ĉiam Antaŭen » sen forgesi la edukajn aŭtoritatojn de la «Buzito-Instituto » ĵus kaptis ĉi tiun okazon por atingi tiun ĉi specialan tagon, kiu signas la naskiĝon de la aŭtoro (la 15-an de Decembro 1859). Ni kunfestis ĉi tiun etosan tagon senzorge.

## Respondenca vorto pri la lingvo

En la nuntempa mondo, vi subite bezonas kontakton trans la landlimo. Vi malkovras la deziron komuniki, interŝanĝi, informi, koni, scii. Tio estas, oni devas intertrakti kun eksterlandanoj, vi partoprenas en mondkunveno, en scienca kongreso, tie oni vidos la gravecon de komunikado kaj komprenos la urĝecon de la vera komunikado.

## Komento pri aŭtoro kaj lingvo



Ĉi-rilate, nia frato instruisto de la Esperanto-lingvo Honoré Sebuhoro klarigas, ke Zamenhof konsideris, ke la neŭtrala lingvo apartenas al ĉiuj homoj senescepte kaj ne nur konsistigus praktikan rilaton sed ankaŭ kontribuus al mildigo de konfliktoj kaj al la promocio de la paco. Li aldonas, ke tiu ĉi lingvo jam atingis gravan rezulton, tio estas vivanta transgeneracia lingvo, kaj estas uzata de miloj da parolantoj tra la mondo. Ni komprenas, ke la lingvo estas kultura kaj egaleca ĉar ĝi permesas al grandaj partoj de la loĝantaro de diversaj landoj komuniki sen perantoj preter lingvaj kaj politikaj baroj.

## Kio estas esperantisto?

Kompreneble, estas esperantistoj en la tuta mondo sed kelkaj ne konas ĝis nun la diferencon inter ĉi tiuj du konceptoj: Esperantisto kaj esperantano. Ekirante de la konkreta signifo « esperantisto » estas homo, kiu praktikas Esperanton nur parolante ĝin, dum « esperantano » estas tiu, kiu praktikas la Zamenhofajn principojn aŭ kiu pli profunde aplikas la verajn principojn de Ludoviko Lazaro Zamenhof.

## Apliko de ĝenarala ideo pri la lingvo

Ja, la respondeculo pruvas al la ĉeestanta opinio ĉi tiu ĉefa aparteco, kiun ni devas memori kiel esperantistoj:



Esperanto estas vivanta lingvo ĉar ĝi ne malrapide disvastiĝas ĉar ĝi ne estas mem informo « la sento », la masmedianoj ignoras ĝin, ĉu vi subtenas ĝin?

Lingvo ne plu povas morti tuj kiam ekzistas ie kolektiva volo uzi ĝin. Estas nia devo konigi ĉi tion al niaj familioj kaj la morgaŭaj junularoj.

Esperantista movado estas tutmonda komunumo de interŝanĝo kaj amikeco. Ĝi proponas al ĝi la vizaĝon de la universala turisma agentejo, kiu aldonus al la kutimaj servoj ĉiujn jam menciitajn karakterizaĵojn: literaturaj, sciencaj, kulturaj interŝanĝoj kaj tiu de dinamikaj teamoj, kiuj volas kunhavigi la profitojn de sia malkovrita progreso. Tial la respondecaj pri la servoj kaj tiuj, kiuj uzas ilin por montri ĉi tiun komunumon.

Esperanto estas natura kaj fleksebla lingvo. Ĝi kapablas esprimi la plej subtilajn minacojn de penso kaj sento, ĝi kapablas permesi, do, la plej justan, literaturan, estetikan esprimon kaj verŝajna kontentigi la plej prudentajn mensojn, pli ombran kaj pli apartan.

Ni diras, ke Esperanto estas paca komunikilo, kiu vivas kaj stimulas

literaturon. Literaturo, kiu nutras junan lingvon, ĉu tio ne estas eĉ pli mirinda? Tio signifas, ke esperantlingva verkisto scias, ke oni legos ĝin en la tuta mondo sen la danĝeroj de tradukado. Fine, nia lingvo de unuiĝo kaj pacigo estas ankaŭ pontlingvo. Ĝi ne estas ligita al iu politika partio, al iu religio, al iu ekonomia intereso. Ĝi estas simple helplingvo. Sed vi devus scii, ke la lingvo estas io tre grava, pli grava ol ni ĝenerale imagas.

### La deklamanto de la poemo

Nia frato **Prosper GATO NDAYAZI**, kiu nuntempe estas la prezidanto de la komitato de Verda Stelano-Klubo, deklamis poemon esperante. La ĉeestanta Ĝenerala Asembleo estis entuziasma kaj aprezis ĉi tiun lingvon. Post tio, kelkaj junuloj decidis fariĝi adeptoj en nia grupo ĉar ili estis tro impresitaj.

Honoré Sebuhoro

## ESPERANTO-INSTRUADO EN SENEGALO

Lastatempe la movado estas pli kaj pli vigla en Senegalo, tio estas la sindeciĉa senĉesa laboro de Hawa Diol kun Abdoukarim, du diligentaj lernantoj kiuj konatiĝis kun esperanto dum la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto kaj profitantoj de la preparikursoj organizitaj de ILEI antaŭ tiu kongreso.



**HAWA DIOL** okazigas kursojn en Senegalo kaj Charles Diatta. senegala aktivulino en sia kompanio okazigis la lastan ĉeestan (Rufisque) la 7an de lernejo MAYA SCHOOL, ĉeestajn kaj retajn asistate de Asane FAYE Notindas, ke la sama propagandas esperanton survarigante ĝin. Ŝi kurson en Rufisko januaro 2024 ene de apud Senelec. Estas ege subteninde, ke niaj kongresoj postlasas bonajn spurojn el kiuj naskiĝas novaj geaktivuloj kaj preparkursoj antaŭ niaj kongresoj estas laŭsajne evidenta garantio ke post niaj kongresoj la movado en Kongreslando ekfloros poste, sed tamen kondiĉe, ke la celoj estu orintentigitaj ne nur al malnovaj esperantistoj sed ankaŭ naski novajn aktivulojn kiuj konlaboros kun siaj longe aktivantaj praŭloj.

Hawa Diol

## E-SEMINARIO EN MALAGASIO,

### EN ANTANANARIVO MADAGASKARO




Tridek du partoprenintoj de Madagaskaro ĝoje ĝuis la belecon de nia Esperanto. Tiu seminario pri Esperanto-instruado okazis de la 4-a ĝis 6-a de januaro 2024 en Antananarivo, Madagaskaro. Tiu seminario havis du kategoriojn de aktivaĵoj: la por instruista trejnado kaj la lingva instruado. Unue, ni trajnis la kvar gejunulojn. Ni faris tiun instruistan trejnadon por provizi konojn kaj kapablecon por gvidi kursojn de Esperanto al komencantoj. Niaj celitoj estis kursfinintoj de la 38 bazaj lecionoj laŭ la instruprogramo de UME. Ni havis por Plenumado mallongajn teoriojn pri instruado, seancon de instru-provado sen lernantoj kaj praktikajn kursojn kun veraj komencantoj.

Due, ni instruis Esperanton al 25 komencantoj inter 11 kaj 40 jaraĝa. Ni instruis ilin per lernant-partoprenigo, per ludo, per kanto. Trejnitaj instruistoj praktikis kun la veraj komencantoj. Atestiloj estis disdonitaj al la kvar trejnitoj kaj al gelernintoj, kiuj sukcesis la skriban kaj parolan testojn. Dume, ni informis al ĉiuj pri la UK 2024 en Aruŝo, pri UEA kaj ĝiaj sekcioj. Ni havas novajn membrojn : 20 membroj en AME (Asocio de Malagasaj Evangiliistoj, KELI sekcio), naŭ membroj de MUKE (Malagasa Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj, sekcio de IKUE), IKUE, dudek du membroj de MEVA (Malagasa Esperantista Virina Asocio), dudek tri membroj de MEJA (Malagasa Junulara Esperanto-Asocio) kaj ĉiuj aniĝis en UME (Unuiĝo de Malagasa Esperantisto) nia Landa Asocio. Nia landa asocio refunkcias kaj jen la konsisto de nia nova estraro :

1. La prezidantino : S-ino RANJA Arc Lydie (La Verda Insuleto de Esperanto en Anosibe)
2. La sekretariino : s-ino RAVOLOLOMAMPIONONA Tatiana (Itaosy Esperanto-Klubo)
3. La kasistino : s-ino ANDRIANIRINA Manohimiharitsara (Itaosy Esperanto-Klubo)
4. La gekonsilantoj :

   S-ino FELANIAINA Rovasoa Erica, (Itaosy Esperanto-Klubo)

   S-ro RAKOTOSON Tolojanahary Fabrice,(Esperanto-klubo La Suno en Toamasina
5. S-ino RAZAFINDRABE Farahasina (La Verda Insuleto de Esperanto en Anosibe)

   S-ino ANDRIANAMBININTSOA Ny Hasina (Esperanto-Klubo en Analamahitsy)
6. Honoraj membroj :

   S-ro FIDILALAO Henriel (Itaosy Esperanto-Klubo) kaj

   Rev D-ro RAVELOHARISON Miora (Esperanto-Klubo en Analamahitsy)

Mi ĝojas kundivi al vi niajn seminariajn efikojn: nia Landa Asocio UME kaj ĝiaj sekcioj agadas denove. Kvar novaj instruantoj pretas labori kaj

disvastigos Esperanton. Niaj gelernantoj daŭras lernas Esperanton kaj volas diskonigi ĝin al aliauloj. Unu el religiaj fratinoj, kiuj gastigis nin komencis lerni Esperanton.

Miora RAVELOHARISON

## ALIA NOVAĴO EL ARUŜO

Post la Seminario okazinta en Aruŝo kiel vi legis en la pria artikolo ĉisupre, naskiĝis nova esperanto-klubo en tiu urbo, kiu arigas gestudentojn el Aruŝo. La kursoj okazas virtuale, gvidas ilin la kunordiganto de la Afrika Kimisiono de UEA Aimé-Patrick MANIRAKIZA el Burundo. Ĉeestas la kursoj almenaŭ 120 homoj, pluraj estas studentoj. La kursoj estas ĝenerale paroligaj. Tio enskribiĝas en la antaŭaj preparoj por la venonta loka partoprenantaro en la unua universala kongreso de Esperanto en Afriko.

## TABELO DE ENHAVO


ENKONDUKO.....1
SUKCESA SEMINARIO EN ARUŜO.....2
RAPORTO KADRE DE LA PROJEKTO NI SEMAS.....3
Pri la instruado.....3
Pri la ekskurso.....3
Aranĝu laŭ la temo.....3
ZAMENHOF-TAGO FESTATA DIVERSLOKE TRA AFRIKO.....4
Zamenhof-tago en Ganao.....4
Zamenhof-tago en Kinŝaso.....4
Zamenhof-tago en Senegalo, elrezultiĝas nova stabo de SEJ.....5
Zamenhof-tago en Lubumbaŝi.....6
RAPORTO DE SENEGALA ESPERANTO-JUNULARO.....7
Prezento de jara vojmapo.....7
Revivigo de agadoj.....7
Masigo de agadoj.....8
Goma Esperanto-Klubo.....9
Detalo pri instruado.....9
Dankado.....10
RAPORTETO PRI ESPERANTO-AGADOJ..10
FARITA EN RUTSHURU DECEMBRA MONATO 2023.....10
Ĝenerala enkonduko.....10
Verda stelano-klubo.....10
ĈIAM ANTAUEN (Grupo de infanoj)…11
NJILI INSTITUTO – BUZITO/REMERA.....11
Zamenhof-festo en Ruĉuru.....11
Respondenca vorto pri la lingvo.....11
Komento pri aŭtoro kaj lingvo.....12
Apliko de ĝenarala ideo pri la lingvo.....12
La deklamanto de la poemo.....13
ESPERANTO-INSTRUADO EN SENEGALO.....13
E-SEMINARIO EN MALAGASIO,.....13
ALIA NOVAĴO EL ARUŜO.....15
TABELO DE ENHAVO.....15

*Esperanto en Afriko* iĝis du monata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Espoir Ngoma Kasati, B.P. 1023, Lubumbashi, DR. Kongo; tel.: +243 972 716 042

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *espoirkasati@gmail.com*.

**Limdato por la 48-a n-ro: la 31-an** de **Marto 2024**

**Membroj de la Afrika Komisono (2022-2025) :**

S-ro Aimé-patrick MANIRAKIZA, **Burundo**

S-ro Koffitche Koufionou, **Togolando**

S-ino Miora Raveloharison, **Madagaskaro**

S-ino Ranja Robertine jean d'Arc Zafinitotsy, **Madagaskaro**

S-ro John E. Magessa, **Tanzanio**

S-ro Espoir Ngoma Kasati, **DR Kongo**